

Skajpkunveno: vendredo, 15a de februaro.

Renato Corsetti, Angela Tellier, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petroviĉ, Ivan Colling (parte).

Ni uzis kiel bazon por niaj diskutoj la raporton kiun preparis Radojica 2019/01/16.

1. La nova paĝo de ILEI pri la universitata agado funkcias bone; prizorgas Radojica kun Jozefo Nemeth.

2. Aparta scienca kajero de IPR, eventuale per *Open Journal Systems* – oni daŭre esploras; punkto restu en la tagordo por nia venonta kunveno.

3. Studentoj traktaĵoj:

- Renato jam sendis al Angela proponon pri mesaĝo por serĉi taŭgajn studentojn, kiuj verku disertacion. Tuj post la kunveno Angela reagis, kaj la mesaĝo estas jam dissendita.
- Viko post du semajnoj renkontiĝos kun du studentinoj – unu preparas laboraĵon pri planitaj lingvoj, la alia pri minoritataj lingvoj. Viko petos ilin verki por ni.
- Ni bezonas prepari regularon, pri kiu ni komune diskutu dum nia venonta kunveno.
- Viko proponis jenan sintenon:
 1. Uzi scienca modelon, nome starigi revuon aŭ reformi IPR-on.
 2. Labori per la OJS sistemo.
 3. Permesi ĉiujn lingvojn, kiam ni havas minimume du kunlaborantojn, kiuj fakas pri la temo de la propono kaj regas ĝian lingvon.
 4. Se la propono estas fine akceptita, la aŭtoroj skribas vastan resumon (ekzemple tripaĝan) per la sama lingvo de la propono, kaj ankaŭ Esperante. Se la aŭtoroj ne sufiĉe regas nian lingvon, la revuo helpas. Ankaŭ la revuo akceptos ĉiujn tradukaĵojn, kiujn la aŭtoroj sendos, kaj alkroĉos ilin en la sama linio de la reta revuilo.
 5. La revuo esas duflanke senpaga: neniu pagas por ke la propono estu publikigita, neniu pagas por la rajto legi artikolojn.
 6. La revuo sekvas postulecon, tiel ke ĝi partoprenos en pluraj prirevuaj datumbazoj kaj estos agnoskita en kelkaj scienciloj.
 7. Ĉio estas Esperante legebla (historio, gvidoj, foliumilo...). Plej eble kelkaj kunlaborantoj aŭ zorgantoj ankaŭ tradukos la enhavon al sia propra lingvo por faciligi la disvastigon kaj partoprenon de samlingvanoj.

4. Elisee ne ĉestis, do la punkto pri **fondo de interlingvistika fako en afrikaj universitatoj** restu en la tagordo por nia venonta kunveno.

5. Kongresoj, konferencoj 2019 kaj 2020.

- 2019 – Radojica raportis ke aranĝoj kontentige progresas. Ĝis nun aliĝis 10, kvanto tute laŭ la normala ritmo de aliĝoj.
- 2020 – La estraro de ILEI akceptis aranĝi ILEI kongreson post la UK.
- Angela petis Radojica sendi mallongan priskribon pri la deziroj /planoj de ILEI rilate konferenco en Kanado (vidu sube) – Angela plusendos al ESF.

"ILEI analizas kun gekolegoj en Kanado kondiĉojn por organizi tie sian 53-an kongreson en la semajno tuj post la UK. La ILEI-kongresa ĉeftemo estos Interlingvistiko - paradigmoj, defioj kaj atingoj. ILEI kutimas havi en la lastaj du kongresaj labortagoj (ĵaŭdo kaj vendredo) simpozion aŭ konferencon pri la kongresa temo. Por la jaro 2020, en la tagoj rezervitaj por la simpozio kaj anstataŭ ĝi, ILEI proponas okazigon de la Dua konferenco de Universitatoj en kiuj Esperanto kaj interlingvistiko estas instruataj. La laborgrupo de ILEI/ESF pri universitata

agado principe subtenas tian planon. Se ankaŭ ESF kaj Universitata Komisiono de ILEI konsentas, ILEI tuj komencos la organizajn preparojn. Aperas ankaŭ demando pri kunordigo de la proponata universitata konferenco kun la planata Nitobe-simpozio en Kanado, 2020. Radojica Petroviĉ, Serbio, Estrarano pri kongresoj de ILEI"

6. Ni ne forgesu pri la tre utilaj informoj kaj proponoj legeblaj en la **Unuoj de Viko**.
7. La **demandareto** kiun preparis Viko estas analizita, kaj al ni estis senditaj la rezultoj, nun legeblaj en la retpaĝo pri universitata agado de ILEI.
8. Pluraj **intervuoj** restas por fari. Viko kontaktos homojn kiam tempo permesos.
9. Ni daŭre klopodu instigi homojn registri siajn kursojn ĉe Edukado.net, sed Angela rekontaktos Katalin-on pri la aparta indiko pri universitataj kursoj.
10. **Venonta kunveno** – Angela sendos Doodle por la mezo de marto.